

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO



DUA EPOKO - JARO II^a : OKTOBRO-NOVEMBRO 1922

10-11

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

OFICIALA ORGANO DE LA

«KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO»

Jarkotizo : 5 pesetoj

GRUPOJ ALIĜINTAJ AL K. E. F.

BARCELONA STELO, Marqués del Duero, 101	BARCELONA
NOVA SENTO, Enna, 156	BARCELONA
PACO KAJ AMO, Asturias, 1	BARCELONA
SEMO (A. E. P.), Carme, 30	BARCELONA
LA RONDO, Provença, 131	BARCELONA
ESPERANTAJ KANTISTOJ, Baix de S. Pere, 77	BARCELONA
LA METIISTO, Travessia S. Antoni, 22	BARCELONA
LUMON, Carrer Major, 36	TERRASSA
ESPERANTISTA JUNULARO,	TERRASSA
ĜERONA ESPERO, Ajuntament,	GIRONA
STUDENTA JUNECO, Seminari,	GIRONA
APLEC «ESPERANTA GRUPO», Mendizábal, 3	SABADELL
BELA ESPERO, Carretera de Vich, 41	MANRESA
NOVA SEMO, Major, 15	REUS
LABORO ESPERANTA, S. Antoni, 1 i 3	VILANOVA I GELTRÚ
ESPERANTA IDEALO, Mn. Cinto Verdaguer, STA. COLOMA DE FARNÉS	
REGENERACIO, Centre Obrer de Cultura «Floreal»	SALT
EMPORDANA EBENAJO,	ARMENTERA
ESPERANTA NESTO, «Joventut Catòlica»,	RIPOLLET
ESPERANTISTA AMIKECO, Plaça Bernardí, 10	MANLLEU
FRATECO, P. Pi i Margall, 14.	VENDRELL
ESPERANTISTA KLUBO «PALMA» Misión, 5	PALMA DE MALLORCA
TARRAGONO ESPERANTA, Unió, 9	TARRAGONA



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administraĉio :
Carme, 30 : BARCELONA

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redaktoro : **Jaume Grau Casas**

Reorganizo

TAM kelkfoje kaj diversloke ni aŭdis pri projektoj de reorganizo de la esperanta movado en Katalunujo kaj ĉefe en ĝia ĉefurbo Barcelona.

Ni kredas ke oni devus diri, pli ĝuste ol *reorganizado*, *daŭra plifortigado*. Grava afero — projekti kaj organizi, sed pli grave ankoraŭ — fari mem.

Ni volas diri, ke ne estas konvenaj al la movado impone aspektantaj organizaĉioj, se ne troviĝas malantaŭ ili efektiva aro da laboremuloj kaj kapabluloj.

Mankas helpantoj al nia Federacio por fari tiom da farota tasko; mankas al la Redakcio de nia gazeto konstanta kaj efika kunhelpo; mankas ankoraŭ pli da entuziasmo kaj sindonemo por ke nia movado estu kontentige fruktodona.

Ni, areto da entuziasmuloj zorgantaj pri la agado de la Kataluna Federacio, kun ĝia gazeto, ĉiujaraj kongresoj, internaciaj Floraj Ludoj, propagandaj festoj, preparo de ekzamenoj, laŭpova eldono de propagandiloj, k. t. p., faras ĉion kion ni povas, sed *nur* tion kion ni povas.

Se aliaj volus helpi nian laboron, la rezultatoj estus pli grandaj. Se ne, la rezultatoj estos proporciaj al niaj *solaj* fortoj. Kaj ne al *ni* oni povos fari riproĉon!

Kun ĝojo ni rigardos la disvolviĝon de novaj iniciatoj, la ekfloraĉon de novaj societoj. Sed estu al ni permesate diri, ke en la vicoj de la «Kataluna Esperantista Federacio» estas ankoraŭ loko por multaj batalantoj, kaj ke *vere* agemaj kunlaborantoj estos kore akceptataj.

* * *

Per la sola helpo de kvinpesetaj jarkotizoj (proksimume 500), nenion pli la Federacio povas fari kaj doni. Se la nombro de federacianoj duobliĝus, tiam restus grava kvanto da mono destinita al la simpla propagando. Sed nun nia kaso apenaŭ sufiĉas por la vivo de la Federacio kaj gazeto.

Oni donu al ni monon, kaj grava propagando estos farata ĉiuflanken. Ĉiu klopodu varbi novan membron. Laŭeble oni memvole plialtigu sian jarkotizon. Memoru ke nia Kasisto akceptas monsumojn por iu ajn difinita celo. Helpu nin forigi la kutiman deficiton de la jarfino. Kaj precipe **NENIU PROKRASTU LA PAGON DE SIA KOTIZAĴO!**



X^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Manresa: 1 - 2 - 3 Aprilo 1923



TAJ karaj legantoj jam scias, ke estis neeble okazigi nian X^{an} Kongreson en Manresa dum la lasta aŭtuno. Hodiaŭ ni ĝojas publikigi la precizan daton de ĝia okazo, dum la venonta Aprilo.

Ni esperas, ke de nun la solenaj jarkunvenoj de la kataluna esperantistaro povos okazi seninterrompe ĉiujare dum la printempo.

La grupo «Bela Espero» komencis jam la organizan taskon kun neatendite granda sukceso, kaj tio permesas supozi ke nia Deka nacia kongreso estos inda je la naŭ okazintaj kaj hele kronos tiun epokon de la kataluna esperantista movado.

Same kiel en antaŭaj Kongresoj, propaganda ekspozicio estos aranĝata. La Manresanoj intencas eldoni ne gvidlibron de la urbo kiel lastjare faris la Gironanoj, sed eĉ veran Kongreslibron. La Urbkonsilantaro, la enurbaj societoj kaj ĵurnaloj kaj kelkaj famaj komercistoj promesis sian plenan helpon al la Kongreso. Nia ŝatata festo de la Floraj Ludoj okazos en la grandega teatro de la «Konservatorio». En vastaj kaj luksaj salonoj havos lokon la kongresaj kunsidoj. Post la du tagoj de la Kongreso, okazos du unutagaj ekskursoj, unu al la monto de salo el Cardona kaj alia al la antikvega romarta monaĥejo de Sant Benet de Bages, kaj ankoraŭ alia kelktaga ekskurso al la montaro Montserrat, geologia fenomeno fame konata.

La urbo Manresa mem enhavas tre interesajn vidindaĵojn el arta kaj arkeologia vidpunkto. Ĝiaj progresemaj loĝantoj montris ĉiam sian amon al porkulturaj movadoj, kaj gastigante la esperantistojn ili sendube montros sian aliĝon al la esperantista idealo.

En venontaj kajeroj ni donos pli da detaloj. Ke ĉiu pretiĝu jam de nun ĉeesti kaj plisukcesigi nian Dekan Kongreson!

Internacia Mondliteraturo

POR LA TUTMONDA ESPERANTISTARO



RION ni devas legi?! Estas certe, ke ĉiu, iomete progresinte rilate la lernadon de «nia lingvo» bezonas la legadon de *internacia* literaturo, *ne* tradukaĵojn el sia *nacia* literaturo. Nia principo ja estas: Kun niaj samnacioj ni parolu la gepatran lingvon, kun alilandanoj Esperanton, la neŭtralan mondhelplingvon! Do, jam pro tio neniu volonte legos la verkojn de sia nacia literaturo Esperantigitajn. Eble li faros tion pro la lingva ekzercado, pro lingva intereso, sed ne por havigi al si la ĝuon, kion prezentas la originalo. Estas ankaŭ iomete danĝere, ĉiam legi Esperanto-tradukojn de samnacioj, ĉar tiamaniere oni ne fariĝos tute lerta, perfekta Esperantisto, kiu scipovas eviti lingvajn naciismojn, tiamaniere oni ne akiros internacian stilon. Multe pli rekomendinda kaj preferinda estas la legado de verkoj, Esperantigitaj per samideanoj el aliaj nacioj. Sur ĉi tiu vojo nia stilo, nia vortfarado pliboniĝos, «nia Esperanto» fariĝos vere internacia. Kaj: legante la verkojn de alinacioj ni enpenetros en la literaturon, kulturon, kutimojn, movojn, vivon de aliaj popoloj. Tio estas nepre necesa, por ke ne nur ekstere, sed ankaŭ interne fariĝu homoj «homaranecaj», kiuj povas senti kaj pensi kun la homoj de aliaj popoloj.

Dum la Genève-a konferenco mi jam publike — kaj konsentite de ĉiuj ĉeestantoj — aludis la necesecon, krei entreprenon, per kiu ni povas ricevi por niaj kursoj, por niaj lernejoj, por niaj propraj liberaj horoj la plej bonajn verkojn de aliaj nacioj, bone Esperantigitajn.

Bedaŭrinde la fame konata firmo Hachette & Cie. en Paris ne plu eldonas Esperantaĵojn. Des pli salutinda estas la cirkonstanco, ke unu el la plej grandaj Germanaj eldonejoj, la firmo Hirt kaj filo en Leipzig, montras grandan intereson por nia movado; ĝi jam eldonis bonajn Esperantaĵojn kaj ĝi jam antaŭ kelkaj monatoj konsentis mian planon, krei specialan fakon por «Internacia Mondliteraturo».

Mi proponis jenajn principojn:

1. Oni akceptu nur verkojn, kiuj estas vere valoraj de sur literatura vidpunkto! Ĉu iu verko estas tia, pri tio decidu la samnacioj mem de la elektota verkisto.
2. Oni komisiu la tradukon de iu ajn verko nur al ano de la sama nacio, al kies literaturo la verko apartenas!
3. Oni zorgu, ke kiel eble plej multaj — se eble ĉiuj civilizitaj — nacioj estu reprezentataj en la entrepreno de «Internacia Mondliteraturo!»
4. Oni komence elektu — por atingi la celon de la 3^a punkto — ne tro longajn verkojn!
5. Oni eldonu en unu volumo nur verkojn de unu aŭtoro kaj nomu la vo-

lumon laŭ lil ne laŭ la tradukinto, kio ŝajnas al mi tre malaprobinda kutimo.

6. Oni komence ne entreprenu tro multon! t. e. oni ne traduku ĉiuspecajn verkojn, sed — tion mi proponas pro la nuna stato de nia movado — nur beletristikajn verkojn, ekz. novelojn, rakontojn, mallongajn romanojn k. c. Pli malfrue oni ja povas decidi pri la traduko de ek. ĉiuspecaj sciencaj verkoj k. a.

La firmo Hirt kaj filo komisiis min, kiel direktoron de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko, zorgi pri la efektivigo de la ideo de «Internacia Mondliteraturo» por la tutmonda Esperantistaro.

Mi des pli volonte agos laŭ ĉi tiu komisiono, ĉar mi mem jam de longa tempo treege deziris tian entreprenon. Ni celas per ĝi tute alion, ol kelkaj alilandaj samideanoj, kiuj volas disvastigi la literaturon de sia propra lando, por disvastigi la kulturon de sia lando. Ankaŭ aprobinda entrepreno, sed tute malsama! Ni volas disvastigi la tutmondan kulturon per la literaturo de kiel eble plej multaj landoj. Pro tio mi ĝojus, se mi baldaŭ ricevus respondojn, ĉu samideanoj el ĉiuj negermanaj nacioj volas helpi, por ke ni ricevu el ĉiu popolo kaj ĉiu literaturo valorajn verkojn Esperantigitajn, taŭgajn por nia celo. Kompreneble la firmo laŭdece rekompencos la laboron de la tradukantoj.

Mi petas, ke ĉiuj, kiuj volas partopreni al nia laboro, nepre necesa por la Esperantistaro, anoncu sian nomon kaj samtempe skribu, kion ili volas traduki. Estas plue rekomendinde, ke ili (se ili ne jam estas konataj kiel lertaj tradukistoj kaj Esperanto-stilistoj) poste sendu parton de sia tradukaĵo, laŭ kiu oni povas juĝi pri ilia lerteco; ĉar ni povas akcepti nur bonajn tradukojn. Sed certe en ĉiu nacio troviĝos sufiĉe da tiaj tradukistoj. Ĝis nun ni jam ricevis promesojn de kunlaborantoj el diversaj landoj. Helpu, por ke ni baldaŭ havu vere «internacian» kolekton, kolekton reprezentontan ĉiujn naciojn.

PROFESORO D-RO DIETTERLE

direktoro de la Esperanto-Instituto por
la Germana Respubliko.



Sonatino

La princino malgajas... Kion sentas princino?
Sopiraroj forkuras el la buŝ' de feino,
ĉar ŝi perdis la ridon, ĉar foriĝis kolor'.
La princino paladas sur la seĝ' sia ora,
la klavar' estas muta de ŝlosilo sonora
kaj en vaz' forgesite dolĉe svenas rozflor'.

En ĝardenon la pomp' de la pavoj sin tiras,
dommastrin' babileme banalaĵojn disdiras,
kaj ridigas tutruĝa histriono je si.
La princino ne ridas, la princino — sensenta;
la princin' persekutas tra ĉiel' orienta
libelulon konfuzan de konfuz-iluzi'.

Ĉu ŝi revas je princ' el ekstrem' orienta,
aŭ pri l'ĉi haltiginto de kaleŝ' elarĝenta
por vidadi lumdolĉon de l' okuloj de ŝi?
Aŭ pri l' reĝ' de l' insuloj de l' rozar' aromanta,
aŭ pri l'estro fiero de la ŝton' diamanta,
aŭ pri l' mastro de l' perloj de Ormuz' idoldi'?

Ha! Princin' malfeliĉa kun la buŝo lilia
volas esti hirundo, esti majpapilia,
disflugadi rapide sub tutblu-ĉielar',
iri sunon laŭ skalo de ardfulmaj ŝiraĵoj,
salutadi liliojn per la majaj versaĵoj
aŭ en venton perdiĝi super tondro de l'mar'.

Ne plu volas palacon, nek ŝpinilon amatan,
 nek balkonon sorĉitan, nek ludiston skarlatan,
 nek la cignojn neĝblankajn sur la lag' en blunud'.
 Kaj malgajas la floroj pro la flor' de l' reĝejo,
 la jasmen' orienta, la nelumb' de l' nordejo,
 okcidentaj dalioj kaj la rozoj de l' sud'.

Malfeliĉa princino kun la bluaj okuloj!
 Kaptis ŝin la oraĵoj, kaptis ŝin ŝiaj tuloj
 en la kaĝon marmoran de la reĝa palac',
 la palaco pompega postulema de gardoj,
 kiun viglas cent negroj kun ĉi cent halebardoj,
 leporhund' nedormema kaj dredraka minac'.

Ho virin' Hipsipilo! — krias buŝ' malbanala —
 (la princino malgajas, la princin' estas pala).
 Ho vizi' adorata, or', arĝent' kaj ebur!
 Kiu flugus en landon kie princ' ĝoje majas
 (la princin' estas pala, la princino malgajas)
 ol la sun' pli brilanta, bela pli ol lazur'!

Ha! Silentu! Silentu! — baptfein' al ŝi diras—
 sur ĉeval' kun flugiloj tien-ĉi rapidiras,
 kun la glav' kaj ĉasbirdo tien-ĉi venas jam
 kavaliro feliĉa vin amanta kun forto,
 el nubej' alvenanta post venkado de l' Morto
 viajn lipojn ardigi per brulkis' el junam'.

RUBÉN DARÍO

El hispana lingvo tradukis

C. CALLEJA

XIV^a Universala Kongreso en Helsinki kaj Antaŭkongreso en Lübeck

L Ü B E C K

La Antaŭkongreso en Lübeck komenciĝis per *salutvespero* en *Hamburg*, en la bela restoracio *Alsterlust*, sur kiu fiere flirtis la Esperanto-flago. S-ro *Senff* kaj D-ro *Mybs* faris grandaplaŭde akceptitajn salutparoladojn, kaj en cetero la pli ol 200 ĉeestantoj estis amuzataj per diversaj prezentaĵoj.

Entute la Antaŭkongreso en Lübeck estis kunveno por amuzado de la partoprenantoj. Mi raportis pri tio detale en Esperanto-Praktiko. La programo enhavis nur unu oficialan aranĝaĵon. Ĝi estis *festkunveno* en «Marmorsaal» de la urba teatro (la 3^{an} de Aŭg. vespere) kun publika parolado de nia asocia prezidanto D-ro *Steche*. En la nomo de l' Senato de Lübeck senatoro *Henze* salutis la ĉeestantaron, dirante ke la internaciaj kongresoj estas rimedo por interkompreniĝo inter la popoloj, precipe, se komuna lingvo estas uzata. S-ro *Sievers* de la Unuiĝo por Akcelado de la fremdulaj interrilatoj akcentis la necesecon de Esperanto por la celoj de sia unuiĝo, kiu jam de longe posedas gvidlibron tra Lübeck en Esperanto.

D-ro *Steche* en sia parolado elokvente kaj konvinke klarigis la utilon de nia helplingvo por komerco kaj industrio, kampo, kiun li kiel grandindustriisto speciale konas. La multnombra neesperantista aŭskultintaro esprimis sian dankon al la parolinto per longedaŭra aplaŭdo.

Poste la reprezentantoj de diversaj nacioj salutis la ĉeestantojn per pli-malpli longaj paroladoj en Esperanto, kiujn D-ro *Möbusz* resume tradukis germanen. Parolis: por Belgujo s-ro *Jacobs*, por Ĉeĥoslovakujo s-ro *Hromada*, por Danujo f-ino *Rybo*, por Holando s-ino *Bramkamp*, por Hungarujo s-ro *Laquer*, por Italujo s-ro, kies nomon mi ne komprenis, por Skotlando s-ro *Crawford*, por Svislando s-ro *Hammer*, por Slovakujo s-ro *Gazdik*, por Bulgarujo s-ro *Atanasoff*.

Post finparolo de Dro *Möbusz* s-ro *Laquer* ne povis lasi la eksonadon de la Esperanta Himno. Sed pro manko de direktado kaj de akompananta muzikinstrumento la kantado malsukcesis. Tio certe faris malbonan impreson al la neesperantistoj. Ĉu vere estas necese, ĉe ĉiu okazo kanti la Himnon? Aŭ oni kantu ĝin neriproĉinde aŭ oni pli bone silentu.

Proksimume 250 samideanoj el 17 nacioj partoprenis la Antaŭkongreson, kiu estis bonege organizita. Dankon al la aranĝintoj, precipe al D-ro *Möbusz*, f-ino *Stein* kaj s-ro *Selmer*! Bonvenanta aldono al la kongresdokumentoj estis plena listo de la kongresanoj, kiu multe helpis la interkonatiĝon. La tuta kongreso pasis agrable en plena harmonio.

Kvar ŝipoj — «Arcturus» el *Holtenu*, «Mira» kaj «Halland» el Lübeck

kaj «Rügen» el Stettin transportis la plej multajn antaŭkongresanojn al la urbo de la Dek-kvara Universala Kongreso.

HELSINKI

Kiam oni en la pasinta jaro en Praha elektis la ĉefurbon de Finnlando kiel nunjaran okazejon de Internacia Kongreso, sufiĉe multaj samideanoj dubis pri la sukceso de la Dek-kvara. Sed la dubemuloj eraris. La Kongreso de Helsinko estas hele lumanta ero en la historio de niaj internaciaj kongresoj. Ĝi ja ne havis tiel grandan partoprenantaron kiel la plej multaj antaŭaj, sed laŭ ĝiaj graveco, organizado kaj ĝenerala pasado ĝi meritas stari en la unua vico.

LA ORGANIZO

Tio, kion la finnaj samideanoj faris por organizi la Dek-kvaran, estis vere modela kaj nur laŭdinda. En ĉi tiu rilato la Kongreso de Helsinko egalvaloras — se ne superas — la plej bonajn el la ĝisnunaj internaciaj kunvenoj de la Esperantistaro. De la unua momento, kiam la kongresanoj suriris finnan teron, ĝis la fino, kiam ili forlasis la belan landon, ili sentis la zorgeme preparintan spiriton de la kongres-aranĝintoj. La Loka Kongresa Komitato, en unua vico ĝiaj sekretario s-ro *Setälä* kaj kasisto s-ro *Leo Jalayala* kun sia stabo de bonege funkciaj geoficistoj, plenumis gigantan laboron, pri kiu respondece gardis la serioza, malmulte parolema prezidanto s-ro *Sändström*.

La *Akceptejo* estis instalita en la vasta Malnova Parlamentejo. Ĉi tiu bela konstruaĵo estis ornamita per la flagoj de ĉiuj landoj, el kiuj venis kongresanoj (kompreneble ankaŭ per Esperantaj). Por la disdonado de la kongresdokumentoj, konsistantaj nur el Kongresa Libro kaj bronzeca insigno, oni aplikis tre praktikan, imitindan sistemon, kiu malebligis ĉiun interpretadon inter la alvenintaj kongresanoj. La informado estis bone organizita tiel, ke la kongresanoj malgraŭ tio ke la finna lingvo por la plej multaj el ili estis kvazaŭ «libro kun sep sigeloj», eksciis ĉion, kion ili deziris kaj bezonis scii.

Specialan preparolon meritas la vere unika *Kongresa Libro*. En konciza formo, tamen sufiĉe detale ĝi informis pri ĉio, kio koncernis la Kongreson. Jen ĝia enhavo sur 120 paĝoj: bildoj en Helsinko kaj Finnlando (14 paĝoj); artikolo pri Helsinko; alfabeto registro de vidindaĵoj, necesajoj ktp.; programoj por ekskursetoj; turista frazareto Esperanta-finna; vortlisto por traduki la plej komunajn ŝildojn, surskribojn ktp.; informoj kaj konsiloj pri kongresaj aferoj; programtabelo de la XIV^a; detala programo de la Kongreso; alfabeto registro de la kongresa programo; landkarto de Finnlando; nomaro de la tuta kongresa estraro; regularo por la kunsidoj de la Kongreso; raporto de la prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj al la Dek-kvara; al-

donoj al la raporto de la prezidanto de K. K. K.; raporto de la Prezidanto de la Akademio kaj Lingva Komitato; raporto de U. E. A. pri la jaro 1921; karto de la komunikadoj inter Finnlando kaj Meza Eŭropo; anoncoj. Do vere multenhava libro ĉu ne? Kiel apartan aldonon ĉiu kongresano ricevis krom tio urboplanon de Helsinko, sur kiu ĉiuj konstruaĵoj, iel konsiderindaj por kongresanoj, estis signitaj per nombroj korespondantaj kun klariga listo sur la dorsa flanko.

La bona organizo de l' Kongreso montriĝis en ĉiuj aranĝaĵoj tiel ke oni vere ne havis kaŭzon por plendi pri io. Tre agrabla estis la aranĝo de la telefonado al la Kongresaj Oficejoj: Dezirante telefoni tien el la urbo, oni bezonis voki al la komunikanta telefonoficistino nur la vorton «Esperanto».

La nombro de la kongresanoj estis proksimume 850 (el proks. 1050 anonciĝintoj). Ankaŭ ĉi-tiurilate la Dek-kvara malpravigis la dubemulojn, kiuj profetis malgrandan viziton. Inter la kongresanoj estis unu, s-ro Hudson el Aŭstralio, kiu partopreninta la Dektrian en Praha, dum tuta jaro restis en Eŭropo por partopreni la Dek-kvaran.

Bedaŭrinde estis nur, ke presita listo de la kongresanoj, kiu estis preparata dum la Kongreso, ne estis preta ĝis ĝia fino. Tia listo ĉiam estas ŝatata helpilo por serĉi konatojn en la kongresanaro.

LA EKSTERA IMPRESO

El la antaŭkongresaj sciigoj de la Loka Komitato jam estas konate, ke la finna ŝtato subvenciis la Kongreson per grandaj monsumoj. Sed ne nur al la okazanta, sed ankaŭ al la okazanta Kongreso la ŝtato kaj la urbo montris sian intereson, salutante la kongresanojn per flagornamado de ĉiuj oficialaj kaj publikaj konstruaĵoj. Ankaŭ la publiko de Helsinko multe interesiĝis pri la internacia kunveno de la Esperantistoj, kiu cetere estis la unua internacia kongreso en la nova memstara ŝtato. La ĵurnaloj tre detale — ĉiutage sur unu ĝis du grandformataj paĝoj — raportis pri la okazintaĵoj de la Kongreso kaj publikigis propagandajn artikolojn pri Esperanto. La finna ĵurnalo «Uusi Suomi» publikigis eĉ longajn raportojn kaj artikolojn en Esperanto kaj enpresis bildojn de la Kongreso kaj amuzajn karikaturojn de konataj kongresanoj. La sportgazeto «Suomen Urheilulehti» eldonis specialan, 24-paĝan, ilustritan numeron nur en Esperanto, kaj la ilustritaj gazetoj «Suojeluskuntalaisen Lehti» kaj «Suomen Kuvalehti» klarigis siajn bildojn ankaŭ per Esperantaj subtekstoj. Nur la ŝovinistaj ĵurnaloj bedaŭrinde iom incitis kontraŭ Esperanto, sekve de artikolo publikigita en «Suomen Sosialidemokraatti». La verkinto de ĉi tiu artikolo estis interrilatiginta Esperanton al politikaj aferoj socialistaj. Sed ankaŭ la socialista ĵurnalo ne restis favora al Esperanto, post kiam per bedaŭrindaj okazintaĵoj en la lasta vespero de l' Kongreso (dum speciala festo por laboristoj la kongresa prezidanto forigis la tie elmetitajn Esperantajn gazetojn socialistajn, kio kaŭzis malagrablan disputon) en socialistaj rondoj ekestis la ridinda opinio, ke Es-

peranto estas burĝa afero kontraŭbatalinda. Povas esti ke per tio la sukceso de la tuta kongreso estas endanĝerigata.

Bone aranĝita *ekspozicio* en Artpalaco de Stenman montris al la neesperantista loĝantaro de la kongresurbo la staton de Esperanto. Ankoraŭ pli efike la Helsingfors-anoj estus informitaj pri nia afero, se estus okazinta iu propaganda aranĝaĵo. La Loka Komitato rezignis ĝin, opiniante, ke ĝi ne havos grandan sukceson, ĉar tre granda parto de la urba loĝantaro pasigas la somerajn monatojn sur la insuloj.

La akcepto, kiun la kongresanoj trovis ĉe la loĝantaro de Helsinki, estis treege bona; precipe tiuj kongresanoj, kiuj estis gastigataj de Helsingfors-anoj, agrable sentis la sinceran gastamon de la finnoj kaj svedoj.

LA OFICIALAJ KUNVENOJ

Dum la antaŭtagmezo de l' unua kongrestago okazis kunsido de la Konstanta Komitato de la Kongresoj kaj *launaciaj kunvenoj*. Ĉi tiuj havis lokon en ĉambroj de Malnova Parlamentejo (Akceptejo). La *germano*j kunvenis je la 9^a—10^a h. Dro Arnhold el Dresden prezidis. Li sciigis, ke s-ro von Frenckell, finna vickonsulo en Dresden, laŭ peto de la Kongresa Estraro konsentis preni sur sin la prezidantecon de l' Kongreso. Konsidere al la malfeliĉo, kiu trafis s-ron v. Frenckell en Finnlando — lia pli juna filo per akcidento dronis dum banado —, li faris grandan oferon al la Kongreso.

Profesoro Dro Dietterle el Leipzig, direktoro de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko, ĉeestis la Kongreson kiel oficiala reprezentanto de la germana registaro. Kiel delegiton de la germana Esperantistaro oni elektis s-ron Kreuz el Frankfurt a. M. kaj kiel vicdelegiton s-ron Ranft el Dresden. Prof-ro Dietterle kaj s-ro Kreuz krom tio estis oficialaj reprezentantoj de la Foiroj en Leipzig kaj Frankfurt a. M.

Oni preparolis diversajn aferojn koncernantajn la oficialan programon de la Kongreso, precipe la inviton de la Esperanto-Kartelo Nürnberg-Fürth, okazigi la XV^{an} Universalan Kongreson en Nürnberg. Post detala diskuto pri ĉi tiu invito oni decidis, energie propagandi por ĝi inter la kongresanoj kaj same apogi ĝin en la kongresa kunsido pritraktonta la demandon pri la loko de la XV^a.

Posttagmeze okazis kunsido de la Komitato por Internacia Organizo kaj multaj *fakaj kunsidoj*, ĉi tiuj parte en la disponeblaj ĉambroj de Malnova Parlamentejo, parte en konferencejoj de la bela Artpalaco de Stenman.

*

Solena malfermo de la Kongreso (merkredon, 9^{an} de Aŭg., antaŭtagmeze je la 11^a) en *Finna Nacia Teatro*. La scenejo kaj la aŭskultejoj estis plennaj de kongresanoj. La kunveno komenciĝis per du muzikaĵoj (Finnlandia kaj La Espero) ludataj de kornorkestro. Poste s-ro *Warden*, anstataŭante

la ne ĉeestantajn prezidanton de la Konstanta Kongresa Komitato, generalo Sebert, kaj prezidinton de la antaŭjara Kongreso, Dro Kamaryt, malfermis la XIV^{an} Kongreson en la nomo de la Ko-Ko-Ko. La oficiala malfermo okazis de s-ro V. Loimaranta, finna ministro por instruado. Lia finlingva parolado estis tradukata de s-ro Setälä. Per afablaj vortoj kaj kun simpatio li parolis al la Esperantistoj, kiujn li kore salutis en la finnlanda ĉefurbo. La finfrazon li diris en Esperanto.

Kiel estraron de la Kongreso oni elektis:

prezidanto: s-ro von Frenckell; vicprezidantoj: s-ro A. Sandström kaj Dro Privat;

naciaj vicprezidantoj: por Estonujo s-ro Sakaria, Granda Britujo s-ro Merchant, Ĉeĥoslovakujo s-ro Pitlik, Germanujo Dro Arnhold, Polujo s-ro Essigman;

ĝenerala sekretario: s-ro Chavet; sekretarioj: s-roj Setälä kaj Jakob; helpsekretarioj: f-ino Ahlström, s-roj Ekström kaj Selinheimo.

S-ro v. Frenckell komencis sian prezidantecon per salutparolo, dirante, ke li devis akcepti sian oficon pro modesteco de la Loka Komitato, kiu ne kuraĝis nomi prezidanton el sia mezo. Al la Komitato li esprimis, en la nomo de la kongresanoj, sinceran, bone merititan dankon pro ĝia granda kaj modela laboro antaŭkongresa. Krome li dankis la Prezidanton de la Respubliko Finnlanda. En finna lingvo li post tio parolis pri la enkonduko de Esperanto en lernejojn de Finnlando, kaj en sveda lingvo li klarigis la utilon de Esperanto por la komerca praktiko. Fine li salutis la vidvinon de Dro Zamenhof en la nomo de siaj finnlandaj samideanoj.

Sekvis grava festparolado de profesoro Dro *Emil Setälä*, fama sciencisto (filologo) kaj honora prezidanto de la Kongreso. En sia tre interesa referato, Esperantlingve farata, li detale pritraktis la necesecon de nia helpa lingvo kaj donis valorajn argumentojn por kontraŭbatali la ankoraŭ ekzistantajn dubojn pri «artefarita» lingvo. Li aludis la hungaran kaj norvegan lingvojn, kiuj en sia nuna formo ankaŭ estas artefaritaj. La referato estas laŭvorte publikigita en la gazetoj «Esperanto» kaj «Esperanto Triumfonta».

Inter la laŭtlegetaj saluttelegramoj estis rimarkindaj tiuj de generalo Sebert, de Sofio kaj Adamo Zamenhof, de la ambasadoro de Estonujo (en Esperanto!), de la Komitato de la venontjara Germana Kongreso en Plauen i. V. kaj de samideanoj el Nova Gvineo.

La Kongreso sendis saluttelegramojn al la Prezidanto de la Finna Respubliko, s-ro Stälberg, al S-ro Ramstedt, finna ambasadoro en Tokio, fervora pioniro por Esperanto en sia lando, al generalo Sebert, al la Ligo de Nacioj kaj al la Internacia Labor-Oficejo en Genève.

Grandega ĝuo por la kongresanoj estis la aŭskultado de «Festa Runo», verkita kaj deklamata de nia eminenta poeto Dro *Kalocsay*. La entuziasme aplaudita poemo estas publikigita en Esperanto-Praktiko n-^o 9.

Poste nia fame konata oratoro Dro *Privat* faris festan paroladon. Ĉi tiun fojon li ne pritraktis, kiel en antaŭaj kongresoj, literaturan temon, sed

Alvoko al la IX^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj



LA Floraj Ludoj okazis tre solene en reĝaj palacoj jam dum la XIII^a kaj XIV^a jarcentoj, partoprenataj de la trobadoroj, mildaj poetoj, kies kantoj estis la animo de la Meza Epoko. Ĉefe en la landoj Provenca kaj Kataluna enradikiĝis tiu ravanta festo, en kiu oni disdonis orajn kaj arĝentajn florojn al la aŭtoroj de la plej bonaj poezioj. La urboj Toulouse kaj Barcelona eĉ starigis Akademion pri la Gaja Scio, al kiu sin dediĉis la famaj Bernat de Ventadorn, Gauseim Faydit, Giralt Riquier, Bertran de Born, Jofre Rudel kaj multaj aliaj, kiuj kantis per sonora lingvo la amon, la ĝentilecon, la virinan belecon kaj kavalirajn agojn, en lirikaj versaĵoj plej diversformaj.

Sed iom post iom silentiĝis la harmonia voĉo de la trobadoroj kaj la poezia festo malaperis. Ankaŭ, pro diversaj kaŭzoj, samtempe defalis la kataluna lingvo kaj la tuta nacia spirito.

Tamen, se la Floraj Ludoj disfalis dum la epoko de la kataluna sunsubiro, dum la kataluna renaskiĝo en la pasinta jarcento ili vekigis al denova vivo. En la jaro 1859 la Katalunaj Floraj Ludoj estis solene restarigataj; kaj al ilia senĉesa ĉiujara okazo ni katalunoj ŝuldas la plenan revivigon de nia nacia lingvo kaj grandparte ankaŭ la brilecon de la moderna kataluna literaturo.

Spertinte tiajn valorajn servojn, la organizintoj de la V^a Universala Kongreso en Barcelona (1909) opiniis ke la enkonduko de la Floraj Ludoj en nian movadon povus simile favori la disvolviĝon de la esperanta literaturo, kaj ili aranĝis la unuajn Esperantistajn Florajn Ludojn, kiuj sukcese okazis dum la V^a Kongreso. Malgraŭ tio, oni ne daŭrigis la feston en la ceteraj Universalaj Kongresoj, eble ĉar ĝia spirito restis internacie nekomprenata.

«Oni ne komprenis—diris nia kara amiko S-ro Pujolà en sia parolado dum la II^{aj} Floraj Ludoj—ke en tiu festo la boneco de la verkoj estas konsiderinda, sed ne la ĉefa afero; ke la pli-malpli granda riĉeco de la premioj estas tute flanka detalo, kiu ne povas aŭ ne devas naski emocijon; oni ne komprenis ke la objekto de ĝia celo estas la komunio de Popolo kaj Poeto ĉirkaŭ la altaro de Beleco kaj Poezio».

Efektive, tia estas la festo kataluna. Oraĵ kaj arĝentaj floroj estas la ordinaraj premioj; de tio devenas la antikva nomo de FLORAJ LUDOJ. Tamen la plej grava el la premioj estas natura floro, kiu rajtigas la gajninton elekti Reĝinon de la Festo. Ni konservis tiun ĉi premion en la esperantaj Ludoj, ĉar oni ne povas donaci premion pli valoran por la spirito ol floro oferota al fraŭlino kaj ŝin iganta simbolo de la Beleco en festo de Poezio.

Imagu nun la feston. La plej bela salono de la urbo ornamita per flagoj kaj girlandoj. La enurbaj aŭtoritatuloj kaj la juĝintaro eniras en ĝin por prezidi la feston, kiun malfermas la urbestro. La nomo de la laŭreato per la natura floro estas laŭte sciigata kaj la gajninto, akompanata de ĉiuj eminentuloj, eliras por alkonduki la Reĝinon elektitan. Ŝi eniras de la brako de la poeto, sekvata de Kortego de Amo konsistanta el kelkaj fraŭlinoj same kondukataj de la aŭtoritataj moŝtoj, dum ludas marŝon muzikistaro kaj aplaŭde salutas la publiko. La Reĝino okupas sian tronon kaj la poeto legas la premiitan verkon. Siavice estas alvokataj ĉiuj gajnintoj, kiuj ricevas la premiojn de la manoj de la Reĝino, kaj la festo finiĝas per altsenca parolado de la Prezidanto. Kun la sama soleneco kiel por la eniro, la Reĝino kaj Kortego forlasas la salanon.

Jen rapide priskribitaj la festo kaj ĝia celo. La «Kataluna Esperantista Federacio», kredante ke estus domaĝe se tiu festo malaperus el la esperanta movado, kuraĝe prenis sur sin la taskon organizi la Internaciajn Florajn Ludojn kaj jam ~~okfoje~~ ilin okazigis, samtempe kun siaj ĉiujaraj Kongresoj.

En la lastaj Floraj Ludoj estis premiataj verkistoj el 16 nacioj. La kvanto kaj kvalito de la premiitaj verkoj estas sendube valora kontribuo al la riĉigo de la esperanta literaturo. Tiuj faktoj montras ke la ideo de la esperantaj Floraj Ludoj fine sukcesis kaj kuraĝigas nin al la daŭrigo de nia entrepreno.

Tial nun ni ĝoje publikigas la alvokon al la IX^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj. Ĉiuj partoprenu la interesajn konkursojn, el «Eksterordinaraj Temoj». Katalunaj samideanoj konkursu la «Tradukotajn Tekstojn». Kaj la esperantaj poetoj sonorigu sian liron, kantante pri Amo, kaj revivigu la mildan trobadoron time glosantan la eternan temon:

Por vi, gracia knabino,
kanzonon ekkantos mi,
mi ne scias ĉu ĝi plaĉos,
ĉu estos inda je vi...

Al la esperantistaj verkistoj:

La Komitato de la IX^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj vin salutas kaj invitas partopreni en la jenaj konkursoj.

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. Originala versaĵo kantanta *Amon*.
- II. Originala *Ama* verko en prozo.

TRADUKITAJ TEKSTOJ

I.—Traduko de la kataluna versaĵo «Cabelleres Vellutades» verkita de Ventura Gassol (Vidu la Septembran numeron de K.E.)

II.—Traduko de la kataluna prozaĵo «L'Amor a l'Ofici» verkita de Eugeni d'Ors (Vidu la Septembran numeron de K. E.)

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

I. — Premio de la Ekscelenca Urbestro de Manresa : 100 pesetoj. Temo : Laŭvola.

II. — Premio de la «Mankomuneco de Katalunujo»: Kolekto de la verkoj de la mezepoka kataluna filozofo Ramón Lull. Temo: Laŭvola.

III. — Premio de la Parlamenta Deputito S-ro Josep Creixell: 100 pesetoj. Temo : Laŭvola.

IV. — Premio de la Deputitoj de la Kataluna Mankomuneco S-roj Valls, Borràs, kaj Minoves : 50 pesetoj. Temo : Laŭvola.

V. — Premio de la Manresa grupo «Bela Espero»: 50 pesetoj. Temo : Laŭvola.

VI. — Premio de «Amikoj de la Popola Kulturo» de Manresa: 50 pesetoj. Temo : Laŭvola.

VII. — Premio de la Gazetara Asocio de Manresa kaj regiono: 50 pesetoj. Temo : Laŭvola.

VIII. — Premio de «Centre de Dependents del Comerç i de l'Indústria» de Manresa : 25 pesetoj. Temo: Esperanto ĉe la asocioj de komercaj komizoj.

IX. — Premio de la Manresaj «Pomells de Joventut» : 25 pesetoj. Temo : Laŭvola.

X. — Premio de la «Manresa Orfeono» : Artobjekto. Temo : Ĉarmo de la muziko.

XI. — Premio de la fama «Bazaro Jorba» de Manresa : 100 pesetoj. Temo : Laŭvola.

XII. — Premio de la «Ekskursi Societo» de la Bages' a regiono : Artobjekto. Temo : Laŭvola.

XIII. — Premio de la Manresa «Laborista Ateneo» : 50 pesetoj. Temo : Laŭvola.

XIV. — Premio de «Montepio Artesà» de Manresa : 50 pesetoj kaj honora diplomo. Temo : Mutualismo.

XV. — Premio de la «Terkulturista Ĉambro de l' Bages»: 25 pesetoj. Temo : Laŭvola.

XVI. — Premio de «Enciklopedia Popola Ateneo» de Barcelona : 25 pesetoj. Temo : Traduko de la popola kataluna kanto «La presó de Lleida». (Havigos la plenan tekston la Sekretario de la Floraj Ludoj).

XVII. — Premio de la esperanta societo «Nova Sento» de Barcelona : 75 pesetoj. Temo : Versaĵo el du strofoj enhavantaj ĉiu 12 liniojn, adaptebla je muziko kaj taŭga kiel himno de la Societo «Nova Sento».

XVIII. — Premio de la grupo «Barcelona Stelo» : 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.

XIX. — Premio de «Kataluna Esperantisto»: Dumviva abono al la gazeto. Temo : Severa unueco, nepra kondiĉo de internacia lingvo.

Inspiron al ĉiuj por la gloro de nia Literaturo!

E. GROSJEAN-MAUPIN, *prezidanto*.—Josep ALBAGÉS.—Louise BRIGGS.—Delfi DALMAU.—Artur DOMÉNECH.—Marian SOLÁ, *sekretario*.

Barcelona, Septembro 1922.

NOTOJ

I.—La aŭtoroj de la kvar premiitaj Ordinaraĵ Temoj (*Originalaj Tekstoj I, II; Tradukitaj Tekstoj I, II*) ricevos lukse binditan ekzempleron de la verko «Vivo de Zamenhof» de nia eminenta pioniro Edmond Privat.

Krome estos donata al ĉiu laŭreato bela atesta diplomo.

II.—Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinaraĵ premiitaj verkoj, la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elekti Reĝinon de la Festo.

III.—La verkoj prezentotaj devas esti verkitaĵ en Esperanto kaj ne ankoraŭ eldonitaj.

IV.—La Festo de la IX^a Floraj Ludoj okazos en Manresa dum la X^a Kongreso de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO la proksiman Aprilon.

V.—Al la manuskriptoj,—kiuj devas esti ricevitaj antaŭ la 31^a de Januaro 1923 de la Sekretario S-ro Marian Solá en la sidejo de la Kataluna Esperantista Federacio (str. Carme, 30, Barcelona)—oni devas aldoni devizon, kaj sendi en koverto fermita, kiu portos la saman devizon, la nomon kaj adreson de la verkinto.

VI.—Manuskriptoj ne estos resendataj, eĉ se ili alvenis post la datolimo por akcepto de verkoj.

VII.—La membroj de la Juĝontaro partoprenos en neniu konkurso.

VIII.—La Komitato publikigos la verdikton per KATALUNA ESPERANTISTO kaj per la esperantaj kaj enlandaj gazetoj kiuj bonvolos ĝin represigi.

politikan. Li salutis Finnlandon kiel unuan ŝtaton, kie Esperanto trovis oficialan atenton de la parlamento. Aludante, sed ne menciante la konatan dekretan de la franca registaro kontraŭ Esperanto, li respondis al diversaj kritikoj pri Esperanto kaj al la opinio, ke nia movado celas detruiri la naciajn kulturojn. Li difinis la Esperantan kulturon, kiu baziĝas sur la respekto kaj amo de la diversaj nacioj kaj kulturoj, sur la reciproka interhoma fratiĝo, kaj li konkludis, ke eĉ ofero de vivo por nia celo ne estas tro granda. Ankaŭ al li la aŭskultintaro dankis per entuziasma aplaŭdo.

Nun la oficialaj delegitoj havis la parolon. Salutis la Kongreson por:

Internacia Labor-Oficejo en Genève s-ro Tarelli, Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco (Genève) s-ro Horner, Unuiĝo de Internaciaj Asocioj (Bruxelles) s-ro Hendrickx, Ministro por publika instruado de Bulgarujo s-ro Mlaĝev, Ministro por publika instruado de Ĉeĥoslovakujo prof-ro Stefskal, Ministro por klerigado de Estonujo s-ro Vaĥer, Ministro por internaj aferoj de Germanujo prof-ro Dro Dietterle, Ministro por publika instruado de Litovujo s-ro Alseika, Ministro por publika instruado de Hispanujo s-ro Diez, Ministro por publika instruado de Nederlando s-ro Isbrücker, Ĉefa Inspekcio Fervoja de Ruslando s-ro Valentinov, Registaro de Urugvajo S-ro Legrand, urbo Milano (urbestro Dro Filjpetti) s-ro Piatti.

Post la oficialaj reprezentantoj parolis la elektitaj naciaj delegitoj, nome por:

Aŭstrujo s-ro Fiby, Aŭstralazio s-ro Gordon, Belgujo s-ro Jacobs, Granda Britujo s-ro Thomas, Skotlando f-ino Baird, Kimrujo s-ro Edwards, Bulgarujo s-ro Mlaĝov, Ĉeĥoslovakujo f-ino Viĉková (por germanlingvanoj s-ro Schoce, slovakingvanoj s-ro Gazdik, hungaringvanoj s-ro Pál), Danujo s-ro Blicher, Estonujo s-ro Vaĥere kaj f-ino Drezen, Finnlando (finningvanoj) s-ro Setälä kaj (svedlingvanoj) s-ro Monsen, Francujo Dro Vanverts, Algerio s-ino Figuières, Germanujo s-ro Kreuz (gvidanto de la Esperanta Fako de la Foiro de Frankfurt a. M.) kaj s-ro Ranft, Hispanujo s-ro Diez, Hebreoj f-ino Fridová, Hungarujo s-ro Balkányi, Italujo s-ro Saggiori, Japanujo s-ro Narita, Jugoslavio s-ro Klajiĉ (kroatlingvanoj Dro Maruzzi), Latvujo s-ro Stranzde, Nederlando s-ino Isbrücker, Norvegujo s-ro Bonnevie, Polujo Dro Loth, Rusujo s-ro Valentinov, Svedujo s-ro Nylén, Svislando s-ro Arago, Ukrainjo s-ro Soltykovyĉ, Urugvajo s-ro Legrand (deklamis belan poemon), Usono s-ro Pellet.

La kunsido finiĝis per — germana marŝo (Hohenfriedberger), ludata de la jam supre menciita kornorkestro, je la 3. h. posttagmeze.

*

Unua laborkunsido (ĵaŭdon, 10. 8., antaŭtagmeze). Ĉiuj laborkunsidoj okazis en la belega Kavalira Ĉambrego de *Nobelara Domo*. La unuan kunsidon prezidis s-ro v. Frenckell. Malfermante ĝin, li atentigis la ĉeestantaron pri la fakto, ke la kunsido okazas en historia loko, kie troviĝas la blazonoj de la nobelaj familioj de Finnlando, inter ili ankaŭ tiu de lia familio.

Post kelkaj aliaj salutparolantoj, s-ro Berg, blinda samideano, salutis la ĉeestantaron en la nomo de la blindaj kongresanoj kaj f-ino Jarvenpää, blinda finna Esperantistino, deklamis kortuŝan salutpoemon «Bonvenon, Gefratoj!», kiun ŝi verkis je la honoro de la Kongreso.

Alige al tio s-ro Hendrickx atentigis pri la blindula movado kaj alvokis la helpon de ĉiuj samideanoj por subteni ĝin kaj la porblindulan gazeton «Esperanta Ligilo».

S-ro Chavet laŭtlegis la raporton de la prezidanto de la Lingva Komitato kaj de la Akademio, kaj s-ro Warden prezentis la raporton de la Konsanta Komitato de la Kongresoj. Ambaŭ raportoj estis akceptataj sen diskutoj.

S-ro Isbrücker, anstataŭanta s-ron Page, la ne ĉeestantan prezidanton de la Komisiono por Ĝenerala Organizo, laŭtlegis raporton pri la laboroj de ĉi tiu Komisiono. Li komunikis, ke post forigo de diversaj malhelpaĵoj fine efektiviĝis interkonsento inter Centra Oficejo kaj U. E. A. (La efektiviĝo okazis sur la ŝipo «Rügen» dum la veturo al Helsinki; vidu la raporton en E. P.) La Komisiono unuanime akceptis la interkonsenton.

Dro Privat detale skizis la interkonsenton laŭ jenaj vidpunktoj: La Esperantistoj estas konsiderataj laŭ du manieroj: 1^e kiel anoj de Naciaj, regionaj kaj lokaj Societoj kaj Grupoj, kiuj zorgas pri propagando en siaj landoj, kaj laŭ individuoj, kiuj grupiĝas internacie por la ĝenerala uzado de la lingvo. Laŭ la unua maniero ili grupiĝos en Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj, kun sidejo en Paris, kaj laŭ la dua maniero ili grupiĝos en U. E. A. Ĉi tiuj du organismoj interkonsentos por elekti Centran Esperanto-Komitaton, kiu zorgos pri la ĝeneralaj interesoj de la tuta movado. Ĉi tiu Komitato ne konsistos el tri anoj de la Reprezentantaro kaj el tri anoj de U. E. A., sed el ses anoj, kiuj reprezentos ambaŭ organizaĵojn. Ĉi tiu Centra Komitato delegos Komisionon por organizi la Kongresojn, kaj ĝi povos organizi ankaŭ teknikajn internaciajn Konferencojn. La Lingva Komitato restos sendependa. La Esperantistoj grupiĝos ankaŭ en Fakaj Societoj, kiuj havos kunsidojn dum la Kongresoj, prezentos kandidatojn al la Lingva Komitato kaj povos kunlabori pri la organizo de la teknikaj Konferencoj.

Fine Dro Privat laŭtlegis la provizoran tekston de la interkonsento. La definitiva decido pri la interkonsento estis prokrastata ĝis la dua laborkunsido, en kiu la teksto estos en ĉies mano. En la nuna kunsido oni nur diskutis pri la interkonsento, kiu ĝenerale estis salutata kiel unu el la plej gravaj okazintaĵoj en la Esperanta movado. Dro Arnhold priparolis la financon flankon de la afero kaj proponis kunvenon de reprezentantoj de Naciaj Societoj, kiuj neoficiale diskutu la financon subtenon al la oficialaj institucioj. Ĉi tiu propono estis akceptata, kaj la kunveno estis fiksata je lundo matene, antaŭ la laborkunsido.

Oni unuanime decidis sendi dankan rezolucion al s-ro Page pro lia valora laboro, krome al generalo Sebert kaj s-ro Stettler. Jen la tekstoj de la tri rezolucioj:

«La Kongreso esprimas al s-ro Page, prezidanto de la Komisiono por Ĝenerala Organizo, profundan dankon pro lia granda laboro, kiu estis utila bazo por la starigo de la fina interkonsento».

«La Kongreso esprimas al s-ro generalo Sebert sian sinceran dankon pro lia konstanta kaj persista laboro por nia afero».

«La Kongreso sendas al s-ro Stettler, prezidanto de U. E. A., plej koran saluton kaj deziron pri resaniĝo, esperante, ke li baldaŭ reprenos sian utilan laboron en la internacia organizo».

Kiel oficiala reprezentanto de la Prezidanto de la Finna Respubliko ĉeestis ĉi tiun kunsidon kolonelo *Aejmelacus-Aimä*, adjutanto de la Prezidanto. S-ro v. Frenckell salutis lin en la nomo de la Kongreso kaj petis, ke li transdonu al la Prezidanto la dankon de la Kongreso pro la signo de intereso, kiun li montris al nia afero.

Fine la Kongreso unuanime akceptis la proponon de ĝia prezidanto, danki la direktanton de la miksitaj ĥoro «Suomon Lauulu», s-ro Heikki Klemetti, kaj ĉiujn anojn de tiu ĥoro pro la bela koncerto prezentita al la kongresanoj. (Vidu la raporton en E. P.)

* * *

Kunsido de U. E. A. (ĵaŭdon, 10. 8., posttagmeze). Dro Privat prezidis. Tagordo: Raporto pri la administra kaj financa agadoj dum la jaro 1921 — Proponoj — Nomigo kiel Honora Membro de s-ro Szabuniewicz. Malferman- te la kunsidon, Dro Privat akcentis la specialan signifon, kiun la nuna Kongreso de U. E. A. havas, estante la lasta speciala Kongreso de ĉi tiu organizaĵo.

La raporto, publikigita en la Kongresa Libro, estis diskutata de kelkaj parolantoj laŭ diversaj vidpunktoj. Oni pritraktis la membrecon, la gazeton, la delegitecon, la financojn kaj la organizon de la movado de U. E. A. D-ro Privat kaj s-ro Jakob donis la necesajn klarigojn. Pro manko de loko ne estas eble, doni ĉie tie detalan raporton pri la diskutitaj aferoj. Kiu interesiĝas pri ĉi tiuj, legu la oficialan protokolon publikigitan en n-o 9 de la gazeto «*Esperanto*». Entute la agado de la respondecaj gvidantoj de la Asocio estis aprobata. La financa stato de U. E. A. ja ne estas bona sekve de la malfacilaĵoj kaŭzitaj de la valuta mizero en diversaj landoj de Eŭropo, sed estas espereble, ke la situacio iom post iom pliboniĝos per laŭcelaj klopodoj de la estraro. Tre gravaj estas la interrilatoj de U. E. A. al la Ligo de Nacioj, dank' al la konstantaj klopodoj de D-ro Privat, kiu estas komitatano de la Ligo. La movado de U. E. A. ĝojige progresas kaj promesas bonajn sukcesojn.

U. E. A. havis nur ĉi tiun unu kunsidon. En estonteco ne plu okazos apartaj Kongresoj de U. E. A. Sekve la lasta kunsido havis iom da graveco en la historio de U. E. A. kaj de la Esperanta movado entute.

* * *

Dua Komuna Laborkunsido (vendredon, 11. 8., antaŭtagmeze). Ankaŭ ĉi tiu kunsido havis specialan gravecon en la historio de Esperanto. En ĝi la kongresanoj kaj per ili la tutmonda Esperantistaro definitive decidis pri la starigo de Oficiala Esperantista Organizaĵo, kiu dum kelkaj pasintaj jaroj estis multe diskutata. Fine oni trovis taŭgan solvon de la sufiĉe malfacila problemo, dank' al la bona volo de la gvidantoj de niaj du plej gravaj organizaĵoj: Centra Oficejo en Paris kaj U. E. A.

Dro Privat prezidis. Malfermante la kunsidon, li komunikis, ke monkolleto aranĝita post la antaŭtaga kunsido de U. E. A. por la financa subteno al la kreota Centra Komitato, havis bonan rezulton: 1245,50 Fr. sviz.

Krome la prezidanto informis la kongresanojn pri grava rezolucio, akceptita de la faka kunsido de la Ruĝa Kruco koncerne la interrilatojn de ĉi tiu organizaĵo al Esperanto. Li aldonis, ke la Esperantistaro havas la devon, interrilati kun la Internacia Komitato de l' Ruĝa Kruco kaj proponi sian kunlaboron.

S-ro Horner, la oficiala reprezentanto de la Ruĝa Kruco, petis la Kongreson, aprobi la rezolucion, car la aprobo efike helpos la propagandon por Esperanto inter la anoj de l' Ruĝa Kruco. Laŭ propono de s-ro Warden la aprobo okazis unuanime.

Post disdonado de la teksto de la interkonsento, proponita de la Komisiono por Ĝenerala Organizo, komenciĝis la detala diskutado pri la Oficiala Esperantista Organizo. Oni esploris kaj preparolis ja tekston paragrafon post paragrafo. Kelkaj proponitaj ŝanĝoj estis akceptataj. Per fina voĉdonado la tuta teksto estis unuanime akceptata en la sekvanta formo:

OFICIALA ESPERANTISTA ORGANIZO

La Kongreso rekomendas, ke, por koncentrigi la fortojn de la Esperantistaro kaj trovi monrimedojn por subteni la ĝeneralan movadon, la Oficiala Esperantista Organizo estu jena:

I.

1. La naciaj societoj elektu *Konstantan Rerezentantaron de la Naciaj Societoj* (K. R.), konsistantan el unu reprezentanto de ĉiu nacia societo, kun nombro da voĉoj proporcia je la nombro de anoj, por kiu ĝi pagis kotizon al la kaso de la K. R. Tiu Rerezentantaro starigos sian internan regularon. Ĝi povos havi prezidanton kaj ĝeneralan sekretarion elektitajn ekster de la Rerezentantaro. Ĝi zorgos pri la reciproka informado kaj kunlaborado de la naciaj societoj por komunaj celoj kaj pri ilia monsubteno al la komunaj institucioj de la Esperantistaro.

2. La individuaj Esperantistoj grupiĝu internacie per aliĝo al Universala Esperanto-Asocio, kiu disvastigas la ĝeneralan uzadon de la lingvo.

3. La fakaj (teknikaj kaj profesiaj) societoj grupigu la Esperantistojn por propagando kaj uzado en specialaj rondoj.

II.

La Konstanta Rezentantaro de la Naciaj Societoj kaj Universala Esperanto-Asocio interkonsentos pri la elekto de *Centra Esperanto-Komitato*, kiu konsistos el ses anoj, oficantaj dum tri jaroj kaj reelektotaj po du ĉiujare.

Tiu Centra Esperanto-Komitato zorgos pri la ĝeneralaj interesoj de la movado. Ĝi starigas Centran Kason kaj por tio enspezas donacojn, kotizojn de naciaj societoj pere de la Rezentantaro kaj subvencion de U. E. A.

III.

La *Lingva Komitato* estas sendependa, sed la naciaj societoj, U. E. A. kaj la fakaj societoj povas prezenti kandidatojn al ĝi.

IV.

La Centra Esperanto-Komitato decidas pri la okazigo de la Universalaj Kongresoj kaj komisias ilian organizon al *Konstanta Kongresa Komisiono*, kiu enhavos du reprezentantojn de la Centra Komitato, du anojn de la Loka Komitato de la estonta Kongreso kaj du kuratorojn de la kongresa kaso.

La Universalaj Kongresoj konsistas el
solena malferma kunsido;
laboraj kunsidoj, en kiuj la oficialaj institucioj prezentas raportojn kaj aŭdas la rimarkojn kaj deziresprimojn de la kongresanoj;
fakaj kunsidoj;
kunsidoj de la diversaj oficialaj komitatoj aparte aŭ kune.
La institucioj nomataj «oficialaj» estas:
la Lingva Komitato (L. K.) kaj ĝia Akademio,
la Konstanta Rezentantaro de la Naciaj Societoj (K. R.),
la Universala Esperanto-Asocio kun sia Komitato (U. E. A.),
la Centra Esperanto-Komitato (C. K.) kun sia Konstanta Kongresa Komisiono (K. K. K.)

V.

Krom la Universalaj Kongresoj povos okazi periode oficialaj teknikaj konferencoj, laŭ decido de la Centra Komitato, kiu tamen ne zorgos pri konferencoj politikaj aŭ religiaj.

VI.

La oficialaj komunikoj de la oficialaj institucioj estos publikigataj pere de Esperantistaj gazetoj.

La oficialaj dokumentoj kaj raportoj estos publikigataj per zorgo de la Centra Komitato en *Oficiala Dokumentaro* laŭ siaj nunaj formatoj.

* * *

Laŭ propono de Dro Privat oni poste voĉdonis tri rezoluciojn pri praktikaj rimedoj por funkciigi la novan organizaĵon. La rezolucioj estis unuanime akceptataj post mallongaj diskutoj. Jen iliaj tekstoj:

1. La Kongreso, por faciligi la tujan formadon de la Konstanta Re prezentantaro de la Naciaj Societoj, petas s-ron generalon Sebert kaj s-ron Chavet, ke ili bonvolu tuj funkcii kiel provizoraj prezidanto kaj ĝenerala sekretario de la Re prezentantaro, ĝis la momento, kiam ĝi mem estos fik-sinta sian estraron.

2. La nuna Komisiono pri Ĝenerala Organizo bonvolu plenumi la ofi-con de la Centra Esperanto-Komitato ĝis la momento, kiam tiu Komitato estos elektita. — La anoj de tiu Komisiono estas: s-roj Warden, Chavet, Stettler, Dro Privat, Dro Arnhold, Page, Poncet kaj s-ro Isbrücker, kiu an-s-tataŭas s-ron Page en tiu ĉi Kongreso. S-ro Page estos prezidanto de la Komisiono.

3. La Kongreso petas la Centran Komitaton, ke ĝi zorge reviziu kiel eble plej baldaŭ la antaŭajn regularojn pri organizaj aferoj, por ke ili akor-digu kun la akceptita interkonsento.

Poste oni diskutis pri diversaj proponoj faritaj de generalo Sebert pri ŝanĝoj en la Regularo de niaj Universalaj Kongresoj. La Kongreso malapro-bis la proponon pri eventuala rifuzo de aliĝo de iuj personoj (kontraŭuloj de Esperanto ktp.). Rilate la proponojn pri la budĝeto de la Loka Komitato oni aprobis rimarkigojn de s-ro Setälä pri neaplikebleco de divido de la kontoj en du partojn, pri malaprobo de instruado de Esperanto al enlanda-noj kaj pri repago de vojaĝelspezoj. La propono, okazigi niajn Universalajn Kongresojn nur en dujaraj periodoj, estis malaprobata.

Entuziasme aplaŭdata estis telegramo de la Prezidanto de la Finnlanda Respubliko, kiu dankis la Kongreson pro la sendita saluto kaj deziris al ĝi plej bonan sukceson.

La lastan parton de la kunsido prezidis s-ro Sandström. Cedante al li la prezidantan seĝon, Dro Privat memorigis pri la grandaj servoj, kiujn tiu energia pioniro de Esperanto faris por la propagando en Finnlando.

Sekvis diskuto pri propono de la Nederlanda Societo pri la organizo de karavanoj de neesperantistoj en niaj Kongresoj. S-ro Isbrücker motivis la proponon, dirante, ke ĝi ne havas malamikan intencon kontraŭ la svedaj samideanoj. (Por la Kongreso en Praha ili organizis karavanan, en kiu partoprenis multaj neesperantistoj). S-ro Nylén klarigis la celon de tiu karava-no, kiu okazis nur por la propagando de Esperanto. Post opiniesprimoj de kelkaj aliaj kongresanoj oni fine akceptis la proponon de la Nederlanda So-cieto: Karavanoj de ne-esperantistoj estu aranĝataj tute sen iu rilato al niaj Universalaj Kongresoj kaj ne dum la tempo de ĉi tiuj Kongresoj.

*

Tria komuna laborkunsido (sabaton, 12.8., antaŭtagmeze). S-ro v. Frenckell prezidis. Unue oni aprobis la raporton de s-ro Applebaum, honora sekretario de la Komitato por starigo de Zamenhofa Monumento en Warszawa. La monokolekto por la monumento ĝis nun donis rezulton de 2600 Fr. sviz. Laŭ propono de s-ro v. Frenckell la Kongreso akceptis deziresprimon, ke ĉiuj Esperantistaj societoj instigu la ĝeneralan daŭrigon de la donacado por la monumento de Dro Zamenhof. S-ro Essigman en la nomo de la Komitato por starigo de la monumento informis pri tio, ke verŝajne ĝi estos inaŭgurata nur en la venonta jaro. Li proponis rezolucion pri la organiza laboro de la Loka Komitato en Warszawa. La rezolucio estis unuanime akceptata.

Sekvis solena momento. Ĉar laŭ la nuna finna kalendaro ĉi tiu kongrestago havas la nomon Klara, la antaŭnomon de s-ino Zamenhof, la Kongresa Komitato decidis fari ovacion al la vidvino de nia Majstro. Dro Privat iris al s-ino Zamenhof kaj resumis la penson, kiu plenigas la korojn de la kongresanoj en ĉi tiu tago de Sta. Klara. Li skizis la penigan vojon, kiun nia Majstro iris, kaj li dankis al la vidvino pro la heroa persisteco kaj kuraĝo ebligintaj la starigon de nia movado. Eĉ en plej mallumaj tagoj ne forlasis ŝin la konscio, agi por la bono de venonta generacio, kaj se la Esperantistaro rememoras pri la kreinto de nia lingvo, ĝi neniam forgesas la helpon, kiun lia edzino donis al li.

La kunvenintaro emocie aplaŭdis la belajn parolojn. S-ro Isbrücker alportis belan bukedon de rozoj, kiun D-ro Privat transdonis al s-ino Zamenhof. La honoritino kortuŝite dankis.

Dro Privat poste raportis pri la Komisiono pri Instruado. Li skizis la kreon de ĉi tiu Komisiono sekve de instigo de la Pola Societo. El tio rezultis la Konferenco pri Instruado de Esperanto en lernejoj, okazinta en Genève, kiu ebligis al la reprezentitaj registaroj, senpartie prijuĝi, laŭ la metoda laborplano, la akiritajn spertojn. Li informis pri sendo de raporto al la ministroj por instruado en ĉiuj landoj, citis la efikon al pluraj el ili kaj menciis la favoran decidon de la albana registaro, kiu promesis enkonduki Esperanton kiel devigan instrufakon post organizo de la lernejoj. Li aludis, ke en tricent urboj diverslandaj nun okazas oficiala instruado de Esperanto al infanoj, bedaŭris la neprecizecon de multaj propagandistoj kaj admonis pri kunhelpo, disciplino kaj sistema laboro. Poste li iom detale priskribis la Konferencon en Genève kaj atentigis pri la valoro de tiaj specialaj kunvenoj.

D-ro Arnhold esprimis dankon pro la bonega arango de la Konferenco de Genève kaj klarigis malkomprenon de la laboristaj Esperantistoj. D-ro Privat informis pri ĉi tiu afero, ke la laboristaj Esperantistoj havis reprezentanton en prof-ro Dietterle (komisiita de germanaj laboristoj), s-roj Patti kaj Rotta (komunumo Milano) kaj s-ro Young (Brita laborista delegito).

✱

Lundon, 14. antaŭtagmeze je la 9^a, okazis la neoficiala diskuto pri la financa demando de la Centra Komitato de la Konstanta Repraesentantaro. Oni decidis proponi kotizaĵon de dekonon de la membra kotizaĵo de U. E. A.

Je la 11^a antaŭtagmeze Dro Privat faris interesan paroladon pri la Ligo de Nacioj, en kiu li detale klarigis la staton de la Esperanta afero ĉe la Ligo. Malgraŭ tio, ke ankoraŭ ekzistas kelkaj malfacilaĵoj rilate la decidon de la Ligo pri oficiala akcepto de Esperanto, la parolanto opiniis, ke iu favora decido estos farata.

* * *

Solena ferma kunsido (mardon, 15., antaŭtagmeze). S-ro v. Frenckell prezidis. La ĉefa punkto de la tagordo estis la decido pri la loko de la venontjara Universala Kongreso. Oficialaj invitoj alvenis de Esperanto-Kartelo Nürnberg-Fürth kaj el Warszawa. Dro Lot en la nomo de la Pola Esperantista Societo reprenis la inviton por la venonta jaro, sed ne nuligis ĝin. Li petis nur prokraston, ĉar montriĝis, ke la invito por la venonta jaro estis tro frua. Do restis nur la invito de Nürnberg-Fürth, kiun s-ro Hönigsberger (en la nomo de la Kartelo), Dro Arnhold (en la nomo de Germana Esperanto-Asocio) kaj Dro Privat varme subtenis.

S-ro v. Frenckell ja admonis la kongresanaron, severe esplori la demandon, ĉu eble alia loko estus pli taŭga ol la proponita, sed la kongresanaro entute konsentis pri Nürnberg, kiu post mallonga diskuto aklame estis elektata kiel okazejo de la XV^a Kongreso. Do la germanaj Esperantistoj duan fojon havos la honoron, gastigi la internacian samideanaron en sia lando, supozeble en Kongreso, kiu laŭ la nombro de sia partoprenantaro superos ĉiujn antaŭajn fakte okazintajn. Signife ankaŭ estas, ke Nürnberg estas la naskiĝloko de la mondlingva movado en Germanujo; sufiĉas menciigi nur la nomon Einstein! La Nürnberg-aj samideanoj certe klopodos pri tio, ke la Dek-kvina fariĝu inda al tiu grava historia fakto.

Post salutparolado de s-ro Eroŝenko, blinda samideano el Peking, s-ro v. Frenckell faris sian prezidantan finparoladon. Li esprimis siajn pensojn pri la finiĝanta Kongreso, parolis pri la pensoj kaj rememoroj de la kongresanoj post tiaj tagoj de feliĉo en gastama lando kaj inter ĉiulandaj amikoj kaj speciale akcentis la plej gravan okazintaĵon de la Dek-kvara: la finan unuigon de la ĝis nun dise laborantaj fortoj de nia movado. Li kore dankis la Lokan Komitaton pro ĝia bonega aranĝo de la Kongreso, menciante la meritojn de la komitatoj kaj ĝiaj ĝehelpantoj. Longedaŭra, tondra aplaŭdo konfirmis liajn dirojn.

Ankaŭ Dro Privat esprimis similiajn pensojn, kuraĝigante al plua energia laboro por la progreso de nia movado malgraŭ baroj, malhelpoj, ĝenoj kaj tedoj. Li aparte laŭdis la bonan akcepton, kiun la internacia Esperantistaro trovis en la bela lando de mil lagoj kaj centmil insuloj, kies belajoj restos neforgeseblaj al la kongresanoj. «Vivu Finnlando!» estis lia lasta deziro entuziasme aplaŭdata.

S-ino Isbrücker konstatis, ke la laŭdira parolemo de virinoj ŝajne ne estas vera, ĉar en ĉi tiu Kongreso parolis preskaŭ nur viroj. Tial ŝi almenaŭ en la fino volas laŭtigi sian virinan voĉon por danki la Kongreson kaj instigi al serioza daŭrigo de nia laboro.

S-ro Isbrücker, por ne lasi parolinta sian edzinon sola, esprimis la opinion de ĉiu kongresano, ke la Dek-kvara superis ĉies atendojn. Ĉar li ne povas fini sen iu spritaĵo, li proponis, ke oni transloku la Lokan Komitaton de Helsinki al Nürnberg, por esti certa pri simile bona aranĝo.

Dro Arnhold dankis al la prezidanto s-ro v. Frenczell kaj gratulis lin pro lia modela gvidado de la kongresaj aferoj. Li memorigis ankaŭ pri la multaj meritoj de s-ro v. Frenczell rilate nian movadon en Germanujo.

S-ro Diez el Bilbao rakontis pri sia vizito en Warszawa. Li alportis de tie memoraĵon (floreton) de la tombo de nia Majstro kaj transdonis ĝin al la Kongresa Komitato. S-ro v. Frenczell dankis en la nomo de la Komitato, kiu konservas la memoraĵon kiel signon de sincera amo al nia Majstro.

Vigle aplaŭdata ekstaris s-ro Setälä kaj dankis la kongresanaron pro la konfido, kiun ĝi havis, veninte tiom multnombre en la malproksiman landon. Li komparis nian movadon al ponto de norda lando al aliaj kaj esprimis sian ĝojon pri la ĉefa atingitaĵo de la Kongreso: unu ĝenerala organizaĵo.

S-ino Zamenhof emocie dankis pro la gastamo kaj afableco de la finlandaj Esperantistoj.

Fine s-ro v. Frenczell fermis la Kongreson, kaj post komuna kantado de la Himno la kongresanoj disiris, adiaŭante unu la alian per la deziro: Ĉiu la revido en Nürnberg!

La Dek-kvara pasis. Vivu la Dek-kvina!

F. ELLERSIEK

(El *Germana Esperantisto*)



ENLANDA MOVADO

BARCELONA. — En la grava «Academia Mercantil Moderna», je la unuaj tagoj de Aŭgusto, S-ro Jaume Grau faris du propagandajn paroladojn ĉeestatajn ĉiu de pli ol 150 gelernantoj kaj instruistoj de la Akademio. La parolanto priŝtraktis la utilecon de Esperanto, ĉefe el praktika vidpunkto, kaj detale citis la Foirojn kaj komercajn entreprenojn uzantajn la internacian lingvon. Li ankaŭ aludis la Konferencon de Instruistoj en Genève kaj diris ion pri la pedagogia valoro de Esperanto, kiel preparo al la ellernado de fremdaj lingvoj. Estas komencita speciala kurso por infanoj, gvidata de la parolinto S-ro Grau.

— La societo «Nova Sento» aranĝis Esperantan Ekspozicion, kiu estis tre vizitata. La 9^{an} de Septembro, je la 10^a vespere, ĝi estis solene malfermata kun ĉeesto de la urbkonsilanto S-ro Ramón Palau. S-ro Palau esprimis sian amon al ĉiuj kulturaj movadoj kaj diris ke Esperanto estas unu el la plej atentindaj. Li promesis helpi ĉiurilate la esperantan movadon kaj, tute speciale, klopodi por atingi plialtigon de la subvencio kiun ĉiujare donas la Barcelona urbestro al la societo «Nova Sento». En la nomo de la esperantistaro diris dankajn vortojn S-ro Grau, de la K. E. F., kiu ankaŭ parolis pri la signifo de la Ekspozicio kiel pruvo de esperantista vivo. Post detala vizitado al la propaganda Ekspozicio, belege ornamita per palmoj, okazis intima lunĉo kun esperantistaj tostoĵoj por la progreso de nia idealo. La prezidanto de la societo, S-ro Gil, dankis la kunhelpon de ĉiuj Barcelonaj samideanoj por sukcesigi la feston, kaj oni ĝin finis per kantado de «La Espero».

Novaj kursoj komenciĝis sub gvidado de samideanoj Gil kaj Bolós.

— La societo «Paco kaj Amo» malfermis du kursojn grandnombre ĉeestatajn. Ĉiuvendrede okazas kun plena sukceso paroladoj en esperanto pri ĉiuspecaj temoj. La 5^{an} de novembro vizitis la grupon niaj germanaj samideanoj S-roj Dix, Seifert kaj Schaaf, kiuj ludis kelkajn muzikajn pecojn. Tre ĝoje pasigis la tempon akceptantoj kaj akceptatoj.

— La grupo «Barcelona Stelo» komencis novan «babilulan rondon» ĉiujn dimanĉojn matene. Novaj kursoj de Esperanto estas en preparo.

— La «Barcelona Esperanta Societo» transloĝiĝis en la straton Baix de Sant Pere, 5, kie ĝi povos pli oportune disvolvi sian laborplanon. Kurso okazas, gvidata de Pastro Fidel Orobitg. Ĉiutage je la 7.^a vespere kunvenas tie samideanoj.

— La librejoj «Rosals» (strato Porta-ferrissa), «Editorial Poliglota» (strato Petritxol) kaj «Rafols» (Passeig de Gràcia) nun vendas esperantajn librojn kaj akceptas abonojn al esperantaj gazetoj. Ni rekomendas ilin al la samideanaro.

— Sinjorino Petronila Navas, edzino de samideano S-ro Beltri kaj fratino de nia Administristo S-ro Pere Navas, mortis en Barcelono la lastan Oktobron. Ni esprimas al la karaj amikoj Navas kaj Beltri nian sinceran partoprenon en ilia funebro.

TERRASSA. — La grupo «Lumon» eldonis novan propagandan folion «Terrassa-Esperanto», kun bonege verkita artikolo.

Okazas la jenaj kursoj: Grupo «Lumon»: Du (elementa kaj supera) por viroj; unu (elementa) por fraŭlinoj; kaj alia por infan-

noj. Ĥora Societo «La Llanterna»: Kurso por viroj. Respublikana societo (Popoldomo): Elementa kurso. Societo «Joventut Terras-senca»: Supera kurso.

Nun loĝas en Terrassa la Leipzigaj samideanoj S-roj Arthur Dix, Walter Seifert kaj Willy Schaaf, kiuj trovis profesion okupon en nia lando danke al la amikeco de siaj korespondantoj. Okaze de ilia alveno, la grupo «Lumon» aranĝis feston la 22^{an} de oktobro, dimanĉon, posttagmeze. S-ro Chaler, nome de la Grupo, bonvenigis la tri samideanojn. Respondis al li per dankplenaj vortoj la plej juna el la alvenintoj, la simpatia kaj jam kara amiko nia S-ro Dix. S-roj Sobré, el «Aplec Esperanta Grupo» (Sabadell); Alberich, el «Paco kaj Amo» (Barcelona); kaj Grau, Redaktoro de K. E., paroladis esperante pri la fratiga sento de nia ideo. Fine niaj germanaj amikoj denove salutis, kaj regalis nin per ludado de kelkaj kantoj germanaj kaj esperantaj. Kronis la feston la esperantista himno.

RIPOLLET. — «Esperanta Nesto» organizis por la 5.^a de novembro propagandan kunvenon. Pastro Fidel Oorbitg, kiu ĉeestis la lastan Kongreson en Helsinki, rakontis siajn impresojn dum la longa vojaĝo tra fremdaj landoj kaj dum la Kongresaj tagoj. Tre varme li sentigis la ĝojon sin senti dum kelkaj tagoj en plena Esperantujo. Poste parolis S-ro Grau, el Barcelona; S-ro Josep Serrat, Prezidanto de «Barcelona Esperanta Societo» kiu elokvente kaj sprite invitis ĉiujn tuj eklerni Esperanton kaj veturi la proksiman jaron al Nurenbergo por konstati ĝian taŭgecon; S-ro Marian Solà, el Terrassa, kiu trafe komparis la unuajn paŝojn de Esperanto je la unuaj paŝoj de ĉiuj plej geniaj elpensajoj; S-ro Conrad Domènech, instruisto el Girona, kiu sin turnis al la aŭskultantaj infanoj per bela kaj emocia parolo; kaj Pastro Planas, Paroĥestro de Ripollet kaj fondinto de la «Esperanta Nesto», kiu sen helpo de vortoj scias montri sian bonkorecon kaj entuziasman samideanecon. La orfeono de Ripollet aŭdigis katalunajn popolajn kantojn, per tio pliagrabiligante la feston. Je la fino, ĉiuj gesamideanoj kune kun la orfeono kantis nian himnon.



Bibliografio

LA LUKSDOMETO, de H. Meilhac kaj L. Halévy, tradukita de Sinjorino M. Fauvart-Bastoul. Havebla ĉe la tradukistino: 62, str. Chabot Charny, Dijon, Cote-d'or. Prezo: 3'50 frankoj.

Unuakta komedio, tre bela, bonege tradukita. Ĝia argumento estas simpla kaj ridiga. Volumo 50-paĝa, zorge presita.

ESPERANTA KRESTOMATIO el verkoj de diversnaciaj aŭtoroj, kolektita de M. S. Valentinov. Eldono de Ĥersona Esperantista Societo, Ruslando. 32-paĝa broŝuro, enhavanta mallongajn rakontojn, kun stilo tute bona.

KIEL ONI FONDAS KAJ ORGANIZAS ESPERANTAN GRUPON? Kun aldono de Statutoj por esperantaj grupoj, de Prof. H. C. Hanns Sappl, ĉefsekretario de Moka kaj Ilkue. Dua, plibonigita kaj pligrandigita eldono. Paŭlus-Eldonejo, Karmeliterplatz 5, Graz (Aŭstrujo). Prezo: 0'50 pesetoj.

La unua eldono de tiu ĉi utila verko baldaŭ elĉerpiĝis. La dua, pli bone aranĝita, certe atingos la saman sukceson. Ĝi enhavas tre saĝajn konsilojn por la estroj de niaj Grupoj.

LA EKSPERIMENTO DE ECCLES, kun notoj pri la instrumentado, de Elizabeth Hogg. Numero 1 de la Kolekto de Brita Esperantista Asocio, 17, Hart Street, London W. C. 1. Prezo: 4 respondkuponoj.

Broŝuro 24-paĝa raportanta pri la famia eksperimento farita en la angla urbo Eccles, dank' al kies bonaj rezultoj la Eduka Aŭtoritato permesis la enkondukadon de Esperanto en la programon de Green Lane lernejo. La metodo de instruado uzita de samideanino Hogg estas speciale taŭga por infanoj.

AMFITRIONO, komedio en tri aktoj, en verso, de Molière, tradukita de Enrique Legrand. Eldonis: Esperantista Centra Librejo, 51, rue de Clichy, Paris. Prezo: 3 frankoj.

Libro 128-paĝa, bonege prezentita, enhavanta unu el la plej belaj komedioj de la klasika franca verkisto. La traduko estas perfekta kaj pro ĝi meritas ĉiajn gratulojn S-ro Legrand, el Montevideo, kiu faris ĝin por ekzercado apenaŭ du monatojn post la tago kiam li komencis lerni Esperanton. La ritmo de la versoj estas plene trafa kaj la stilo — majstra. Tiu ĉi valora verko ne devas manki en ĉiu esperanta biblioteko.

TRA LA MONDO, Internacia legolibro kolektita kaj prilaborita de Paul Bennemann. Dua parto, por progresintoj, kun aldono de 4 komponaĵoj. Eldonis: Ferdinand Hirt & Sohn, en Leipzig (Germanujo).

Tiu ĉi dua parto estas ankoraŭ, se eble, pli bona ol la unua, kaj multe pli longa. Jen ĝia riĉega enhavo: Antaŭparolo. Paroloj de l' saĝo; El la mondliteraturo; El la vivo, la artoj kaj la sciencoj; Por vesperaj horoj: Historiaj anekdotoj, Ŝercaĵoj, Problemoj kaj enigmoj; Muziknotoj. Aparte valoraj estas kelkaj originalaj artikoloj de S-ro Bennemann, nome: Evoluo de la moderna pentrarto; Ekskursoj al senfinaĵoj; La penso de Einstein; Kiam la Iliado estis skribata?; La teoremo de Pythagoras. La stilo de la tuta verko estas bona, sed bedaŭrinde iom makulas ĝin kelkaj gramatikaj formoj rektimaj, esprimoj strangaj kaj nenecesaj modernismoj. Malgraŭ tio ni plene rekomendas tiun seriozan, agrablan kaj instruan verkon.

ESPERANTAJ GAZETOJ

intersanĝe ricevitaj de «Kataluna Esperantisto», publike legeblaj ĉe la legoĉambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

- | | |
|---|-------------------------------------|
| Amerika Esperantisto, Boston | Konkordo, Zagreb |
| Arguso, México | Kristana Espero, Kaustinen |
| Aŭstria Esperanto-Raporto, Wien | La Eklezia Revuo, Huddersfield |
| Belga Esperantisto, Antwerpen | La Esperanto-Kolektanto, Wien |
| Bizantio, Konstantinopolo | La Espero, Stockholm |
| Brazila Esperantisto, Rio de Janeiro | La Interŝanĝo, Béziers |
| Brazila Vivo, Fortaleza-Ceará | La Nova Epoko, Moskvo |
| Bulgara Esperantisto, Sofia | La Policisto, Budapeŝt |
| Bulletin de la Société Française pour
la propagation de l'Esperanto, Paris | La Progreso, Pizen |
| Egipta Esperantisto, Aleksandrio | La Revuo Orienta, Tokio |
| Esperanta Finnlando, Helsinko | La Semisto, Sabadell |
| Esperanto, Genève | La Verda Ombro, Taihoku |
| Esperanto-Praktiko, Dresden | Le Monde Espérantiste, Paris |
| Esperanto Triumfonta, Köln-Horrem | L'Esperanto, S. Vito al Tagliamento |
| Espero Katolika, Udenhout | Libero, Kioto |
| Espero Teozofia, Praha | Literatura Mondo, Budapeŝt |
| Export Esperantist, Chicago | Literaturo, Wolwyn Garden City |
| France-Esperanto, Paris | Litova Stelo, Kaunas |
| Germana Esperantisto, Dresden | Marto, Haida |
| Hispana Esperantisto, Madrid | Nova Eŭropo, Praha |
| Holanda Esperantisto, Amsterdam | Nova Tagiĝo, Genève |
| Hungara Esperantisto, Szeged | Sennacieca Revuo, Paris |
| Informa Bulteno de B. E. S., Barcelona | Skandinava Esperantisto, Rockford |
| Internacia Komerca Revuo, Zürich | Sveda Laborista Esperantisto, Gefle |
| Internacia Pedagogia Revuo, Antwerpen | Teristo, Moscou |
| Katolika Mondo, Graz | The British Esperantist London |
| Katolika Sento, Venezia | Vegetarano, Hamburg |
| | Verda Utopio, Osaka |

NIA GAZETO ESTAS LA PLEJ LITERATURA

Jen kelkaj el la aperontaj verkoj :

LA KALIKOTA VESTO, Elena Alanic, trad. Isidre Torrents.

LA PUNINSTRUO, Josep Carner, trad. Josep Ventura.

Fragmentoj de la kataluna poemo LA ATLANTIDO, Jacinto Verdager, trad. Josep Grau.

LA SONĜO DE L' EKZILITINO, Maria Elworthy-Posenaer. .

LA VERO, rusa fabelo (versaĵo), S. Frug, trad. Paul Medem.

SANGA NOKTO, (versaĵo), Jacinto Verdager, trad. Josep Grau.

Dua ĉapitro de LA TALISMANO, Walter Scott, trad. Marian Solà.

HISTORIA RESUMO DE LA ESPERANTA MOVADO EN KATALUNUJO, D-ro Jacinto Brémón.

LA AMIKA STRATO, (elegio), Eduardo Marquina, trad. Jaume Grau.

Tradukoj el «KORO», A. de Amicis, trad. Luigi Puppo.

Kelkaj ĉapitroj el QUATREVIINGT - TREIZE, Víctor Hugo, trad. Marian Solà.

LA KAMENOJ DE LA GASTEJOJ, Prudenci Bertrana, trad. Jaume Grau.

AVÍS

Preguem als nostres amics de llocs on la Federació no té delegat, vulguin remetre l'import de la seva quota en segells de correu.

Ens és necessari liquidar el gran nombre de rebuts pendants per tal de no interrompre la publicació de la nostra Revista.